

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet ♦ huhtikuu ♦ aprilo ♦ 2/2005



Katja Lampinen laütlegas novaĵojn en studioĉelo. Intervjuo de Katja sur paĝo 22.

Vintraĵ Tagoj, p. 5, 17, 19

Anja Karkiainen, p. 8 ♦ Pasporta Servo, p. 10

Aŭtunaj Tagoj en Lesjöfors, p. 15 ♦ Probal Daŝgupta, p. 24

Dolchamar ja talvipäivät lehdissä, s. 25

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet

ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen aikakauslehti. Suomen Esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.

Språkpolitisk tidskrift. Organ för Finlands Esperantoförbund.

Lingvopolitika periodaĵo. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.

Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.

Esperanta Finnlando 1918-23, 1948-53, 1959-1987.

Ilmestyy kuusi kertaa vuodessa. Utkommer sex gånger i året. Aperas sesfoje jare.

Toimitusryhmä/Redaktionsgrupp/Redakta grupo: ✉ eaflehti@esperanto.fi

Päätoimittaja/Chefredaktör/Ĉefredaktoro: *Mikko Mäkitalo*

Vanha Hämeentie 41 as. 9, 20540 Turku. ☎ (02) 2373 848 ✉ ef_redakto@tiscali.fi

Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Ilkka Santtila*

Mannerheimintie 40 D 86, 00100 Helsinki. ☎ (09) 587 6738 ✉ ilkka.santtila@esperanto.fi

Vastaava toimittaja/Ansvarig redaktör/Respondeca redaktoro: *Anna Ritamäki*

Tilauhinta/Prenumerationspris/Abonprezo: 15 e/vuosi/år/jaro;

Jäsenille/ För medlemmar/ Por membroj: 10 e.

Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:

Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ (09) 715 538 ✉ eaf@esperanto.fi

Prenumerationer, adressförändringar: EAF, Broholmogatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.

Pankkitili/Bankkonto: Sampo 800017-230825.

Julkaisija/utgivare/eldonanto: Suomen Esperantoliitto ry – Esperanto-Asocio de Finnlando.

Painosmäärä/Eldonkvanto: 400

Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto ry

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

Prezidanto/Puheenjohtaja/Ordförande: *Anna Ritamäki*

Brokärrvägen 89, 25700 Kimito. ☎ (02) 423 146 ✉ (02) 423 246 ✉ eafprezidanto@esperanto.fi

Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja/Vice ordförande: *Päivi Saarinen*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ paivi.saarinen@iki.fi

Sekretario/Sihteerit/Sekreterare: *Tiina Oittinen*

Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ (02) 230 5319 ✉ eafsekretario@esperanto.fi

Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet / Övriga styrelsemedlemmar: *tuomo.grundstrom*

Tuomo Grundström, Anundilankatu 3, 26100 Rauma. ☎ (050) 5180 590, (02) 822 7779 ✉ @lailanet.fi

Taneli Huuskonen, Lapinlahdenkatu 23 A 7, 00180 Helsinki. ☎ (09) 694 0964 ✉ taneli.huuskonen@netsonic.fi

Markku Saastamoinen, Siukolantie 9 H 12, 33470 Ylöjärvi. ☎ (050) 327 8528 ✉ markku.saastamoinen@jippii.fi

Auli Vihermä, Riisikuja 11 G, 90460 Oulunsalo. ☎ (08) 554 5587 ✉ auli.viherma@pp.inet.fi

Vicestraranoj/Varajäsenet/Suppleanter:

Timo Pirinen, Rinnetie 11-13 D 32, 06650 Hamari. ☎ (040) 592 1756 ✉ timospi@suomi24.fi

Raita Pyhälä, Jykyrintie 3, 69440 Lestijärvi. ☎ (06) 863 7351 ✉ saliko@kase.fi

Eero Rinta-Karjanmaa, Poppelikatu 11-13 A 24, 15520 Lahti. ☎ (03) 783 4448

Kasisto/Rahastonhoitaja/Kassör: *Anna-Liisa Heikkinen*

Asiakkaankatu 2 G, 00930 Helsinki. ☎ (09) 343 1449 ✉ eafkasisto@esperanto.fi

Pankkitili/Bankkonto (EAF): Sampo 800017-230825.

Peranto de UEA / Maksut UEA:lle / Betalningar till UEA:

Sampo 800029-19438647 (la antaŭa ĉefdelegita konto / entinen UEA:n pääedustajan tili).

Adreso ĉe la EAF-oficejo. / Käytä Suomen Esperantoliiton toimiston osoitetta.

Officejo/Toimisto/Kontor: Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17-19.

☎ (09) 715 538 (puh.vastaaja/respondilo). Malfermita: marde 17-19-a horo.

Internet: <http://www.esperanto.fi>



De Norda Esplanado 39 survoje al multflanka festo en 2007

Kiel aspektis ĉe la adreso Pohjoisesplanadi 39 – Norra esplanaden 39 la 27an kaj 28an de aprilo 1907?

Certe ne tute same kiel hodiaŭ, kiam je tiu adreso troviĝas la Akademia librovendejo, sed eble ni tamen starante reale, aŭ en niaj pensoj, je tiu adreso, povos senti la flugilojn de grava pasinta evento: la fondiĝo de Esperanto-Asocio de Finnlando. Tio okazis en la tiama ejo de Polusstelo, la tiama klubo de nia ĉefurbo. Estus interese vidi fotojn de la klubejo aŭ de la fasado de la tiama domo. Informu al EAF se iu el vi trovos bildojn de la aspekto de Norda Esplanado 39 el la komenco de la pasinta jarcento.

Kion diris tiukunvene la unua prezidanto Hjalmar Runeberg, konata ankaŭ kiel Nino Runeberg? Ĉu la 20-30 personoj longe kunvenis? Ĉu la tripersona laborgrupo, fondita dum la unua tago por fari statutproponon, laboris la tutan nokton por povi prezenti ĝin la sekvan tagon? Kiel aspektis la fondantaj membroj, ekzemple librotenisto H. Liipola de Turkuo, instruisto K.J. Saarinen de Tampere kaj W. Andelin de Lahti? Kiel aspektis la redaktoro de Finna Esperantisto, majstro J.A. Wecksell? Kaj kiel aspektis la unua numero de Finna Esperantisto aperinta jam antaŭ la fondiĝo de la asocio, sed en la sama jaro? Mi kuraĝas kredi ke en nia arkivo troviĝas, kvankam mi ilin ne vidis, tiuj unuaj esperantogazetoj eldonitaj en Finnlando kaj ke ili enhavas multajn interesajn informojn.

En nia agadplano ekzistas nun nova ero kun la titolo Preparoj por la jubilea jaro 2007. Sub ĝi estas unu frazo: "La asocio celas dum la jaro signife antaŭenigi la preparajn laborojn por la jubilea jaro 2007". Necesas konstati la fakton:


Jam proksimas tiu grava jaro, vere proksimas.

Iom ni komencis labori kaj pripensi la historiajn aferojn. En VT de Jyväskylä ni gustumis la temon sub gvido de la nuna historia laborgrupo Jukka Laaksonen, Jukka Pietiläinen kaj Mikko Mäkitalo. La historio de FEJO estas preparata kaj jam multe progresis, kiel raportis Mikko en la pasinta numero de Esperanta Finnlando. La historikompiloj de la kluboj donas bazon, same la laboroj de Erik von Hertzen. Surbaze de lia teksto, aperinta en 4/1994, mi povis verki miajn cerbumojn pri la etoso de 1907. Cetere, mi ankaŭ eksciis, ke Polusstelo, la antaŭulo de la nuna klubo, fondiĝis la 18an de februaro 1906, iom pli ol jaron antaŭ EAF.

Esence la preparado de la jubilea jaro estas afero por ĉiuj anoj de EAF. Kune ni atingu ion vere signifan. Tiucele en la pasintaj Vintraj Tagoj en Orivesi ni malfermis novan libron, libron de ideoj. Malmultaj kuraĝis noti ion en la belan notlibron, sed la unuaj notoj aperis kaj eblas aldoni pliajn, ankaŭ rete senditajn (ekzemple pere de la retlisto EAF-agadas; se vi estas ano de EAF kaj ĉu vi ŝatus aliĝi al la listo, kontaktu min!). Ne gravas ĉu ni ĉion proponitan realigos, sed gravas ke ni kuraĝu pensi vaste kaj ambicie. La centjariĝo de EAF ne estu maltrafita!

Ni festu grande. Ni festu malgrande. Ni festu pompe, serioze, freneze, informplene kaj ĝojoplene. Ni festu kune, esperantistoj kaj neesperantistoj, ĉiuaguloj, homoj de ĉiuj anguloj de nia lando kaj homoj de la tuta mondo. Ni havas malpli ol du jaroj por nin prepari, sed ni sukcesos, ĉu ne?

*Historieme salutas
Anna Ritamäki*



Finna bazlernejo pruvigis efika

Lastadecembre nin flatis la publikigitaj rezultoj de internacia PISA-projekto, esploro pri klernivelo de diverslandaj 15-jaraj lernejoj: Finnlando apartenas al la plej bonaj landoj en ĉiuj esploritaj kampoj de klereco.

PISA-esploro de jaro 2003 estis farita en ĉiuj 30 landoj de OECD kaj en kelkaj aliaj landoj. Esploritaj kampoj estis matematiko, legado, natursciencoj kaj problemsolvado. Se ni finnoj povis esti kontentaj jam pro la antaŭa rezulto de jaro 2000, kiam Finnlando estis inter la kvar plej bonaj landoj en ĉiuj kampoj de tiama PISA-esploro, la nova montris eĉ pli bonan: Finnlando estis inter la du plej bonaj en ĉiuj kampoj kaj la plej bona en legado kaj natursciencoj.

La lerneja sistemo en Finnlando baziĝas sur unueco: laŭleĝe deviga bazlernejo por ĉiuj daŭras naŭ jarojn kaj preskaŭ ĉiuj en Finnlando ricevas la bazedukon en municipaj lernejoj, kvankam ankaŭ malmultaj privataj lernejoj ekzistas.

Historie Finnlando trairis jam longan evoluon en direkton de unueca eduko. Jam jare 1866 la finna registaro faris dekreton, laŭ kiu ĉiuj urboj devis garantii lokon en lernejo por ĉiu infano loĝanta en la urbo. Ekde jaro 1898 sama devo koncernis ankaŭ kamparajn municipojn. Jare 1921 fariĝis leĝa devo por ĉiu infano partopreni lernejon. La tiama por ĉiuj deviga lernejo estis sesjara popollernejo, el kiu parto de lernejoj post kvar jaroj apartiĝis al pli supra lernejo.

Naŭjaran bazlernejon Finnlando enkondukis en la 1970-aj jaroj. Ankoraŭ plua paŝo al pli unueca eduko estis en 1980-aj jaroj, kiam oni ĉesis dividi lernejojn de la 7-a, 8-a kaj 9-a jaro al diversaj niveloj en instruado pri matema-

tiko kaj fremdaj lingvoj. Tiutempe okazis diskutado, ĉu la lerneja sistemo spertis jam troan tendencan direkton de egaligo de diversnivelaĵoj lernantoj.

Min, kiu estis kapabla lerni matematikon kaj lingvojn multe pli altnivele ol averaĝa lernejo, iom ĝenis kaj frustrigis tio, ke la instruado devis malrapidi laŭ la nivelo de la plej mallertaj. Oni povas juste demandi, ĉu tre unueca lernejo malobligas la plej bonajn lernantojn progresi tiom alten, kiom ili kapablas. Kelkaj finnaj agantoj de la ekonomia vivo emas emfazi, ke la ekonomio baziĝanta pli kaj pli sur teknologio, bezonas pintajn lertulojn, speciale en matematiko kaj natursciencoj.

La PISA-rezultoj tamen pruvas, ke la finna lerneja sistemo ne aĉas. La esplorita grupo, 15-jaruloj, estas en Finnlando plejparte en sia naŭa lerneja jaro, do en fino de la tuta bazlernejo. Rimarkende estas, ke ne nur averaĝa rezultnivelo estas bona, sed boneco estas en ambaŭ finoj de la skalo: nombro de la plej bone sukcesintaj estas en Finnlando granda kaj nombro de malbone sukcesintaj malgranda. Bazlernejo kreas egalecon, sed samtempe ne blokas la pintajn talentojn.


En Finnlando ŝajnas regi granda konkordo pri tio, ke la publika bazlernejo, egala kaj senpaga por ĉiuj, estas valora kaj utila, tion konkludis ĉiuj esencaj politikaj partioj. Nur de la tre malgranda liberala partio venas modestaj postuloj, ke indus iom pli facile ebligi fondado de privataj lernejoj.

Pli pri PISA legeblas finnlingve en interreto: <http://www.jyu.fi/ctl/pisa>

Mikko Mäkitalo

Kontentiga ĵurnala intereso pri VT

La Vintraj Tagoj ĉi tiun fojon logis malpli grandan nombron da finnaj esperantistoj ol kutime, ĉar nur ĉ. kvardek personoj kolektiĝis en la Orivesi-instituto. Amaskomunikilan intereson la okazo tamen sukcesis logi pli ol kutime. Tuj komence de la tagoj kelkaj centraj funkciuloj de EAF kaj FEJO respondis ĵurnalan intervjuadon kaj en la dimanĉaj numeroj de Aamulehti (la ĉefa ĵurnalo en Tampere) kaj Keskisuomalainen (la ĉefa ĵurnalo en Jyväskylä) aperis artikoloj pri nia movado, kaj ankaŭ en posta Oriveden Sanomat. Sabate matene Tampereen Ra-



Päivi Korjus prezentis la Orivesi-instituton kaj ankaŭ la studmaterialon de la Esperanto-kurso en la distanca instituto.

dio sendis intervjuon kun Markku Saastamoinen pri VT kaj Esperanto.

En komenco de la programo de VT Päivi Korjus, edukplanisto de la instituto, prezentis la ejon rakontante, ke ĝi havas 25 dungitojn kaj 150 studantojn dum la periodo ekde mezo de aŭgusto ĝis fino de majo. La instituto konsistas el tri studlinioj: figuraj artoj, muziko kaj verkado. Dum somero la instituto havas iom alitipan programon kun mallonge daŭrantaj kursoj.

Korjus ankaŭ prezentis la leterkurson de Esperanto, kiun en sia programo havas la distanca instituto (KVS:n etäopisto), kiu funkcias lige de la Orivesi-instituto. Estis konstatite, ke per tiu leterkurso sian studadon pri Esperanto komencis Anja Karkiainen, kiu poste iĝis multfoja premiito pro verkado de poemoj kaj kantoj en Esperanto. Vekiĝis iom da diskuto, ke la instituto povus lanĉi esperantokurson pri verkado de poemoj.

La urbon Orivesi reprezentis la prezidanto de la urba konsilio Riitta Jakara kaj la direktoro pri klerigo kaj gimnazia rektoro Simo Sinervo. Jakara amuzis nin per paroli kelkajn frazojn en Esperanto, ne tamen vere scipovante la lingvon, sed legante anticipe preparitajn frazojn. Ŝi bedaŭris pro neĝusta prononco, sed ni konfirmis, ke la prononcado estis tute komprenebla kaj konstatis, ke iun alian fremdan lingvon oni certe ne legus tiom kompreneble post mallonga ekzerco. Sinervo ne provis paroli Esperanton, sed menciis, ke li vidis la filmon Popularmuziko el Vittula kun ĝia Esperantumado, amuza eĉ por spektanto, kiu ne scipovas ĝin.

La reprezentantoj de la urbo iom priskribis trajtojn de la urbeto, kiun la struktura ŝanĝiĝo de la socio skuis iom pli forte ol averaĝan finnan lokon. Orivesi estas konata pri fabrikado de

ŝuoj, kiu ankoraŭ tie okazas, kvankam eksterlanda konkurenco multe subpremis la komercan branĉon de tekstiloj, vestoj kaj ledaĵoj en Finnlando. La kvanto da senlaboruloj estas en Orivesi pli granda ol en la provinco Pirkanmaa averaĝe.

Prelegoj pri instruado kaj informado

En la prelega programo Patrik Austin rakontis pri sia laboro, instruado de lingvoj. Lia laborejo estas Hero-instituto (Hero = Helsingin seudun erilaiset oppijat = Malsimilaj lernantoj en Helsinki-regiono), organizo, kiu donas edukon por lernejoj, kiuj havas malfacilecojn en lernado. Austin rakontis, ke eĉ 25 procentoj da homoj havas iugradan disleksion, kaj nuntempe oni vidas, ke disleksio ne signifas malintelekton. Laboro kun malfacile lernantaj estas iom malsimila ol laboro en lernejo, Austin en sia instruado uzas multe ludojn, kolorojn kaj ritmon. El tio li faris al ni kelkajn ekzemplojn.

Jukka Pietiläinen prelegis pri informado kaj

konstatis, ke la membronombro de UEA dum longa tempo preskaŭ ĉiujare falis, kaj same falis membronombroj de landaj Esperanto-asocioj en la okcidentaj landoj. Esperanto-asocioj ne multe sukcesis realigi kampanjojn pri membrovarbado, kiel ekzemple Amnestio Internacia. Homoj kutime havas ioman sojlon al membriĝo en Esperanto-asociacion pro tio, ke oni devus lerni novan lingvon. Pietiläinen tamen rimarkigis, ke oni povus ankaŭ en Esperanto-asocioj havi membrokategorion por homoj, kiuj nur subtenus la ideon de internacia lingvo, sed ne aktive realigus ĝin.

Jarkunveno: falanta membronombro kaj financa minuso

En la dimanĉa jarkunveno EAF elektis novan estraron, kiu, inkluzive la vicmembrojn, estas precize sama kiu antaŭe. Dum traktado de agadraporto kaj financa raporto pri pasinta jaro estis iom alarmantaj rimarkoj: Membronombro de EAF falis el 390 al 360 kaj samtempe la financa



Carola Antskog ricevis Pasporta Servo 2005 -libron kaj kolekton de antaŭaj Eŭropaj Bultenoj aperintaj en La ondo de Esperanto.

rezulto estis en minuso signifan sumon da preskaŭ 2900 eŭroj. Tamen konsolige oni povas konstati, ke ne ĉie malaperis la membroj: la blindula asocio Steleto ial perdis plejparton de siaj eksaj 32 membroj kaj la klubo de Helsinki dekon da membroj, dum aliaj membroasocioj stabilis. Do, se tiuj du kluboj povos reakiri sian membraron, ni estas en stabila vojo.

Pri la minusa financo estis konstatite, ke forte kreskintaj preskostoj de ĉi tiu gazeto aludas bezonon pri peto de novaj ofertoj el presejoj. Parte la kresko de preskostoj tamen estas rezulto de agado de nova ĉefredaktoro, ĉar la suma paĝnombro de la ses numeroj en 2004 sumis je 188, dum en 2003 sumis nur 164 paĝoj, kaj oni ankaŭ konscias, ke ampleksa gazeto estas esenca kontribuo por prosperanta asocio. La buĝeton por komenciĝinta jaro la kunveno aprobis, kiel proponita de la estraro, 1263 eŭroj minusa. Tio estas jam strebo al plibonigo, ĉar la buĝeto por 2004 estis 2000 eŭroj minusa.

La jarkunveno invitis al EAF du honorajn membrojn: sian kasiston Anna-Liisa Heikkinen kaj la ĵus demisiintan ĉefdelegiton de UEA Heta Kesälä. Anna-Liisa Heikkinen longtempe prizorgis la praktikajojn pro la oficejo de EAF, sed nun aliaj Helsinkianoj organizis la aferon liberigante ŝin de tiu tasko. Pri Heta Kesälä menciindas, ke laŭ funkcioj de UEA ŝi ĉiam estis unu

el la plej diligentaj landaj ĉefdelegitoj.

Nomumon Aganto de la jaro 2004 ricevis du personoj, Carola Antskog kaj Pekka Välimäki, pro ebligo de partopreno de esperantistaj lernejanaj grupoj en Euroscola.

En fina parto de la Vintraj Tagoj ni veturis al Tampere kaj ricevis viziton al Tampere-talo, la ĉefa kongresejo de UK 1995, kaj apud ĝi la Esperanto-betulon plantitan dum la kongreso. La supra parto de la betulo en iu fazo rompiĝis kaj la trunko de la betulo tial iĝis tribranĉa, kaj la ŝtonŝildon ĉe ĝi vandalistoj dufoje rompjis, sed la obstina betulo vivas plu.

Mikko Mäkitalo



Esperantistoj vidis bonfartron de la Esperanto-arbo apud Tampere-talo.

Anja Karkiainen, multfoje premiita poemverkanto

Anja Karkiainen estas dum kelkaj jaroj konata nomo en la premilstoj de la belartaj konkursoj de UEA. La esperantista kaj poemverkanta kari-eroj de Anja komenciĝis kune. Antaŭ ol lerni Esperanton ŝi nenion verkis, sed poste komencis ankaŭ en la finna.

”Esperanton mi lernis jare 1996 per tiu koresponda kurso de Kansanvalistusseura, kiun tiutempe gvidis Marjatta Rautio. Samjare mi estis en Jyväskylä en la somera kurso. Tie Odd Tangerud deklamis delikatan poemeton, kaj mi kortsuĝiĝis kaj ekamis la lingvon. Poste mi klopodis traduki kelkajn finnajn kantotekstojn, sed ne sukcesis, kaj petis helpon de Odd, kiu afable donis konsilojn. Do mi sendis riman leteron por danki lin, kaj tio estis mia unua versaĵo.”

Inter la unuaj poemoj estis jam ankaŭ la unua premiita, “Sorĉa hor’ de kreiveco”, tio estis en la belartaj konkursoj de UEA jare 1998. Kiam oni gajnas la unuan premion oni ne rajtas partopreni la saman branĉon dum tri sekvaj jaroj. Do Anja proponis al Vesa Pölkki, ke ili kunlabore partoprenu en la branĉo de kantoj.

Vesa estas instruisto de klasika gitarludado en konservatorio de Kuopio, esperantisto jam ekde la 70-aj jaroj. Per melodio de Vesa kaj vortoj de Anja naskiĝis kanto ”Kiam la folioj flavas”, kiu gajnis la duan premion. Ankaŭ sekvajare ili gajnis la duan premion, kaj sekvajare de tiu, 2001, la unuan premion per ”Ĉaŭ, adiaŭ – ĝis revido” (publikigita en EF 2/02).

Do 2002 Anja denove rajtis partopreni la poezian branĉon, gajnante la duan premion, kaj 2003 kaj la unuan kaj la duan premiojn. Sekve ŝi jare 2004 rajtis partopreni nek en poezio nek en kantoj.

Krom propra verkado Anja ankaŭ tradukis tekstojn.



“Estas pli facile mem verki ol traduki poemojn. Plej malfacile estas traduki kantojn, ĉar oni devas kaj konservi la originalan enhavon kaj kongruigi la tekston kun la melodio. Eble mi tamen pli ŝatas tradukadon pro la defieco. Sed mi neniam estas tute kontenta kun la rezultoj.”

Iujn specifajn favoratajn temojn por verkado Anja ne havas.

“Mi ekzemple aŭdas iun frazon de iu... Ofte la temoj venas el Vesa, li estas tre kreiva. Estis ekzemple ideo de Vesa, ke ni faris rimaĵon, kiu konsistas el linio en Esperanto – linio en la finna ktp.”

En Esperantio ekzistas ankaŭ aliaj literaturaj konkursoj ol tiuj de UEA, ekzemple LIRO de La Ondo de Esperanto kaj EKRA en Bulgario. Anja diras, ke ŝi kaj Vesa ne estas tre konkursemaj, sed partoprenas konkursojn ĉefe por havi limdaton por sia verkado kaj tial akiri la kantojn pretaj. La kanto Salmoj, kiun Anja donis por esti publikigata en nia gazeto, ankaŭ estis farita por konkurso.

“Estis finna konkurso pri farado de kantoj de temo fiŝoj. Ni partoprenis per du kantoj kaj gajnis la duan premion per la alia kanto. Ĉi tiu estis ne premiita, sed ni ŝatis la melodion kaj decidis fari tekston en Esperanto al ĝi. Ne iĝis rekta traduko, sed pri la sama fiŝa temo.”

Ankaŭ en KEF en tiu ĉi somero aŭdeblos iliaj kantoj, kantotaj de Liisa Viinanen kun akompano de Vesa.

Mikko Mäkitalo

El Japanio per Pasporta Servo

En februaro venis al Finnlando Joiĉi, vojaĝanto el la fora oriento. Li gastis en Lestijärvi dum 1½ tagoj. Ĉar li bone parolas Esperanton kaj lia maniero vojaĝi ŝajnas iom malkutima kaj tre interesa, mi intervjuis lin.

Mi: Kial vi lernis Esperanton?

Li: Jam kiam mi estis 13-jara, mi eksciis pri Esperanto kaj interesiĝis. Post deko da jaroj mi trovis turisman broŝuron, kie estis dirite, ke per Esperanto kaj Pasporta Servo oni povas malmultekoste vojaĝadi, do mi pruntis librojn el biblioteko kaj eklernis Esperanton memstare. Al mi plaĉas ankaŭ la interna ideo de Esperanto.

Mi: Kiujn landojn vi jam vizitis? Kaj ĉu vi profitas de retpoŝto por kontaktiĝi kun homoj? Mi vidas, ke telefonon vi ne havas.

Li: Ĉiujn eŭropajn krom Estonion kaj Islandon, sed mi baldaŭ vizitos Estonion kaj Rusion. Sen retpoŝto kaj interreto mi ne povus vivi.

(Noto de la intervjuinto: en Lestijärvi li povis uzi la senpagan bibliotekan retservon.)

Mi: Kaj tra kiuj landoj vi venis al Eŭropo?

Li: Tra Azio kompreneble – Sri Lanko, Nepalo, Pakistano, Hindio, Irano, Turkio...

Mi: Ho, kiom longe vi vojaĝis?

Li: Mi vojaĝas de tri jaroj.

Mi: Vi tamen havas tre malmultajn pakaĵojn, nur dorsosakon, ĉu vi travivis malfacilaĵojn pro tio aŭ io alia?

Li: Fakte ne menciindajn. Ie en Hindio mi sufiris pro mia stomako, pro io manĝita, sed kutime ĉio iras glate. Okazis ankaŭ, ke mia pasporto estis ŝtelita, kaj nur per granda peno kaj mono mi povis havigi al mi novan.

Mi: Mi kredas, ke vi bone adaptiĝas al ĉiaj vivkondiĉoj kaj vi bone elturniĝas per Esperanto



Matti Pyhälä renkontis la japanan gaston KANEKO Joiĉi en Viitasaari.

kaj ankaŭ la angla.

Li (modeste): Nu ja, ni japanoj ne laŭdas nin mem. Ni neniam diras, ke ni ion bone faras.

Mi: Bonvolu rakonti iun alian malbonaĵon pri la vojaĝo.

Li: En Makedonio min ekatakis nov-nazio; feliĉe ne estis nokto kaj troviĝis aliaj homoj sur la strato. En ĉiu lando troveblas kaj bonaj kaj malbonaj uloj.

Mi: Kaj kiajn avantaĝojn havas via maniero vojaĝi?

Aperis Pasporta Servo 2005

La senpaga gastiganta sistemo de TEJO, Pasporta Servo, komencis sian trian jardekon. El la modesta nombro de 39 gastigantoj en la unua eldono jare 1974 la nombro nun kreskis al 1364 adresoj en 89 diversaj landoj.

La gastiganta reto kovras ĉiujn kontinentojn, sed kompreneble plej densa ĝi estas en Mez-Eŭropo, dum aliaj regionoj kiel norda kaj orienta Afriko kaj sudorienta Azio havas tutajn eĉ vastajn landojn sen ajna gastiganto. En Eŭropo ekzistas almenaŭ unu gastiganto en ĉiu lando krom Grekio, Slovenio kaj la plej etaj landoj kiel Monako, Liĥtenŝtejno kaj San Marino.

Apenaŭ surprizo estas, ke el unuopaj landoj la plej grandan gastigantaron havas Francio (148), sekvata de Germanio (110). En ili preskaŭ ne ekzistas loko, el kiu ene de 100 kilometroj ne troviĝus gastiganto, kaj simile densa reto da gastigantoj estas ankaŭ en Pollando, Litovio, Hungario, Nederlando kaj Belgio. Iom surprize la trie plej grandan nombron havas Ukrainio (82), kiun sekvas Rusio (78), Pollando (77), Usono (65) kaj Brazilo (53).

Finlandon reprezentas 10 gastigantoj en 7

diversaj lokoj, la maldense loĝata norda duono de nia lando norden ekde Kuopio kaj Lestijärvi restanta sen gastigantoj. Niaj skandinaviaj najbarlandoj havas iom pli grandan reprezenton, inkluzive lokojn tiom nordajn kiel Boden en Nord-Svedio kaj Tromsö en Nord-Norvegio. En Estonio tamen estas nur unu; en Latvio estas 8 kaj en Litovio 27, kio proporcie kun loĝantaro estas aparte multe. Rusio ofertas abundan aron da gastigantoj en diversaj lokoj etendiĝantaj trans centraj kaj sudaj partoj de Rusio ĝis Krasnojarsk en centra Siberio, kaj ankaŭ paron da lokoj en la fora oriento, sed en la vasta Rusio lasiĝas intere ankaŭ lokoj sen gastiganto ene de centoj da kilometroj.

Por povi uzi la Pasportan Servon, aĉetu la libron, ekzemple per EAF je prezo de 15 eŭroj, el la oficejo aŭ tra eafmendoj@esperanto.fi. Senpage vi ricevos ĝin, se vi aliĝos al la gastigantoj – tio por la sekva jaro eblos ĝis komenco de novembro. Vidu ankaŭ <http://www.esperanto.net/ps>.

Mikko Mäkitalo

Li: Vojaĝante per Pasporta Servo oni povas vidi la ĉiutagan vivon en la vizitataj landoj kaj renkonti gastigantojn amikemajn.

Mi: Ĉu ĉiuj gastigantoj bone parolas Esperanton?

Li: La lingvonivelo tre varias, unuj preskaŭ perfekte parolas, aliaj scias nur kelkajn vortojn.

Mi: Vi mem havas bonegan vortostokon. Kiel vi sukcesis havigi al vi tiun trezoron?

Li: Mi ja parolas preskaŭ nur en Esperanto de longe kaj multon lernis de la gastigantoj.

Mi: Ĉu vi pentas, ke vi venis al Finnlando? Estas ja vintro kaj malvarme.

Li: Tute ne mi pentas. La vetero estas pli agrabla ol en Germanio en novembro-decembro.

Mi: Bonvolu diri du aŭ tri interesaĵojn kiujn vi vidis aŭ aŭdis en Finnlando. Mi esperas, ke ankaŭ en nia malgranda municipo (960 loĝantoj) vi trovis ion vidindan.

Li: En Turku ni havis Esperantan renkontiĝon. Mi antaŭe sciis, ke finnoj estas silentemaj, sed ili ne estas pli silentemaj ol aliaj skandinavoĵoj. En Lestijärvi min interesis la vizitoj al la lernejo kaj al la preĝejo de la pentekostanoj.

Saliko

UEA tiras atenton de UN al lingvaj rajtoj

Pro siaj konsultaj rilatoj kun la Ekonomia kaj Socia Konsilio de Unuiĝintaj Nacioj, UEA havas la rajton liveri al UN-organoj skribajn dokumentojn, kiuj rilatas al tagordaj punktoj de iliaj kunvenoj. Prezidanto Renato Corsetti sendis dokumenton al la Komisiono de UN pri Homaj Rajtoj por distribuo inter la membroj de ĝia 61-a sesio en aprilo, rilate al la tagorda punkto, kiu pritraktos la ekonomiajn, sociajn kaj kulturajn rajtojn.

UEA atentigas la Komisionon, ke laŭ la dua artikolo de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj ĉiuj rajtoj kaj liberecoj difinitaj en la Deklaracio apartenas al ĉiuj homoj sen diferencigo i.a. laŭ lingvo, sed UN kaj ĝiaj membroŝtatoj donis al la lingva aspekto de la homaj rajtoj malmulton da atento ĝis nun.

La dokumento de UEA elstarigas la negativajn sekvojn de la edukado de infanoj en alia lingvo ol la gepatra. Laŭ multaj esploroj uzo

de netaŭga lingvo en lernejo estas unu el la plej gravaj kaŭzoj de antaŭtempa forlaso de lernejo, kiu siavice kondukas al seriozaj sociaj problemoj, ĉar ĝi pligrandigas la riskon je senlaboreco, krimado, alkoholismo kaj drog-uzado. Laŭ studo de UN mem, la plej malriĉaj landoj povus ŝpari grandegajn sumojn, se la lingvaj homaj rajtoj de iliaj loĝantoj estus respektataj per la uzado de lokaj lingvoj en instruado.

Pli ĝenerale UEA komentas ankaŭ la uzon de nur kelkaj difinitaj lingvoj por kontaktoj inter homoj de malsamaj popoloj esti malkontentiga kaj diskriminacia praktiko kaj kontraŭdira al la dua artikolo de la Universala Deklaracio. UEA proponas, ke la Komisiono starigu laborgrupon por pristudi la problemojn de lingvaj homaj rajtoj kaj la malobservon de homaj rajtoj pro lingvaj malegaleco kaj maljusteco.

(el komuniko de UEA mallongigis mm)

Junaj esperantologoj prelegu en UK

Jen kaj jen aperas junaj talentaj esperantistoj kun universitata klero, eĉ kun doktoreco, kiuj verkis interesajn esperantologiajn studojn, prezentis disertaciojn, kaj tamen restas relative nekonataj. La bedaŭrinde nesufiĉa intereso en la movado por tia scienca agado ofte sekvigas certan frustron aŭ eĉ malaperon de tiuj talentuloj. La Esperanto-movado tamen bezonas ĉiun talentulon, ne nur en faka apliko, beletro ktp., sed aparte ankaŭ en la sferoj de interlingvistiko kaj esperantologio. Ja restas ankoraŭ multo por esplori pri internacia lingva komunikado, pri planlingvoj kaj tute aparte pri Esperanto kun ties komunumo, por havi pli bonan scienca bazitan fundamenton por niaj klopodoj kaj argumentoj.

Pro tio la tradicia Esperantologia Konferenco, okazonta kadre de la 90-a Universala Kongreso en Vilnius, ne rilatos al iu konkreta temo sed

estos loko precipe por junaj esperantologoj. Ili prezentu siajn studo-finajn disertaciojn, diskutigu siajn aperintajn aŭ aperontajn verkojn aŭ informu pri temoj, pri kiuj ili estas laborantaj, aŭ pri scienc-organizaj aspektoj de sia esperantologia agado. Krom tio la konferenco diskutu, kion ŝanĝi, por ke junaj intelektuloj sin sentu pli forte ol ĝis nun motivitaj verki science pri Esperanto.

Estas planate eldoni la aktojn de la konferenco. La Estraro de CED, kiu aŭspicias la konferencon, elektos la plej bonan inter la kontribuoj por eventuala aperigo en la socilingvistika revuo "Language Problems & Language Planning". Interesitoj sin anoncu ĉe d-ro Detlev Blanke <dblanke.gil@snafu.de>.

(el komuniko de UEA mallongigis mm)

Labora vizito al Unesko

La prezidanto de UEA Renato Corsetti faris laborviziton al la sidejo de Unesko en Parizo la 26-an de januaro. Dum la vizito akompanis lin vicprezidanto Claude Nourmont kaj s-ino Renee Triolle, kiu estas la ĉefrepresentanto de UEA ĉe Unesko.

Dum la renkontiĝoj kun funkciuloj de Unesko precipante atenton ricevis la kunlaboro de Unesko kaj UEA por la programo de la kulturo de paco. La delegitaro de UEA inventaris la ĝisnunan kontribuon de UEA al tiu projekto. En ĝi elstaras la Esperanta eldono de la Manifesto 2000 kaj la kolektado de subskriboj por ĝi. Ĉar la kampanjo plu daŭras, UEA promesis denove instigi esperantistojn al nomkolektado.

En interna kunsido de la UEA-delegitaro pri plua evoluigo de la Unesko-agado partoprenis

ankaŭ d-rino Barbara Despigny, kiu havas 20-jaran sperton pri tiu agado kaj ankaŭ nun estas unu el la reprezentantoj de UEA ĉe Unesko. Dum la kunsido d-rino Despigny transprenis ekzempleron de la plej lasta ero en la Serio Oriento-Okcidento, la romano "Aventuroj de la brava soldato Ŝvejk en la mondmilito" de J. Hašek, por donaci ĝin al la respondeculo de Unesko pri agado por interkultura dialogo. Oni diskutis ankaŭ pri intensigo de la kunlaboro kun ILEI, kiu same kiel UEA havas oficialajn rilatojn kun Unesko. Aperis i.a. ideo pri komuna komisiono de UEA kaj ILEI pri Unesko, kiu ĉefe konsistus el la reprezentantoj de ambaŭ organizaĵoj en Parizo.

(el komunikado de UEA mallongigis mm)

The Hospitality Club – interreta alternativo por Pasporta Servo

Dum Pasporta Servo ekzistis jam dum tri jardekoj spertante malrapidan, sed preskaŭ seninterrompan kreskon, ĝin jam per nombro de gastigantoj multoble superas interreta similaĵo, The Hospitality Club. Laŭ informoj de la retejo, Hospitality Club estis lanĉita jare 2000, dum unu jaro da funkciado jam akiris milon da membroj kaj momente ofertas 45 751 membrojn en 159 landoj, el kiuj 874 en Finnlando.

The Hospitality Club funkcias pure baze de la interreto. La sola kondiĉo por aliĝo estas funkcia retadreso, krom tiu aliĝinto devas doni en la sistemon sian plenan nomon kaj adreson. Kontaktante alian membron oni devas informi sian pasportan numeron, kiu ene de la eŭropa Schengen-regiono, kie oni ne bezonas pasporton, anstataŭeblas per leĝe valida identigilo.

Hospitality Club ŝajnas celi eĉ plian liberecon

kaj senpagecon ol Pasporta Servo. Dum gastiganto de Pasporta Servo ĉiukaze restas tutan jaron sur paĝo de la presita libro, en Club Hospitality eblas membriĝi tuj antaŭ ekveturo kaj ek membriĝi tuj post vojaĝo. La kostojn de funkciado de la retejo oni kovras per reklamoj.

Hospitality Club estas ne pure anglalingva, sed la kompleta informaro troviĝas nur en la angla kaj ŝajnas, ke momente oni praktike devas regi la anglan por sciiĝi pri ĉio nepre. Inter la 19 lingvoj, en kiuj ekzistas io, estas ankaŭ Esperanto, sed ankoraŭ nur ĝenerala prezentiĝo estas en Esperanto. Kelkaj partoj, ekzemple regularo kaj la oftaj demandoj, ekzistas ankaŭ en franca, germana kaj hispana.

Mi ne provis membriĝi, sed min interesas, se iu jam havas spertojn.

<http://www.hospitalityclub.org>

Mikko Mäkitalo

UEA denove havas komisionon pri faka agado

Post longa paŭzo UEA denove havas komisionon pri faka agado. Dum iom da tempo Marija Beloŝevic (Kroatio) estis komisiito de UEA pri faka agado, sed la Estraro konkludis, ke pro la vasteco de tiu kampo pli konvena estas kelkmembra komisiono. Estrarano Amri Wandel estas kunordiganto de la nova komisiono, ĝiaj membroj estis elektitaj Beloŝevic, Petro Chrdle (Ĉeĥio), Imre Ferenczy (Hungario) kaj Istvan Gulyas (Hungario). Chrdle respondecis pri la faka agado de UEA estinte estrarano en la periodo 1998-2001 kaj li organizas Konferencojn pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (KAEST). Ferenczy estas prezidanto de Universala Medicina Esperanto-Asocio kaj Gulyas vicprezidanto de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio. Ĉiuj komisionanoj estas membroj de la Komitato de UEA.

(el komuniko de UEA mallongigis mm)

Terminologia Forumo en Vilnius

Fariĝis jam kutimo aranĝi en Universalaj Kongresoj programeron dediĉitan al interŝanĝo de spertoj inter homoj, kiuj verkas fakvortarojn aŭ alimaniere okupiĝas pri problemoj de la evoluo de la faka lingvaĵo de Esperanto. Ankaŭ en la 90-a UK en Vilnius okazos la Terminologia Forumo.

La Forumo ebligas al terminologoj informi pri verkitaj fakvortaroj kaj pri la problemoj, kiujn oni spertis kaj eblos informi pri projektoj kaj eventuale varbi kunlaborantojn. Apartan atenton oni donos al la lastatempaj klopodoj refunkciigi la Terminologian Centron de UEA (TEC).

Kiuj volas kontribui, bv. sin direkti al la organizanto de la aranĝo, d-ro Detlev Blanke, <dblank.gil@snafu.de>.

(el komuniko de UEA mallongigis mm)

Reta Jarlibro testata

La 7-an de januaro komenciĝis publika testado de nova reta servo de UEA, "Reta Jarlibro". Pere de tiu informa sistemo la individuaj membroj de la Asocio havos la eblecon vidi la samajn informojn kiel en la papera eldono. La principa diferenco estas, ke la "Reta Jarlibro" estas maksimume aktuala en ajna momento, kiam oni ĝin konsultas.

Ekzistas ankaŭ certaj specifaĵoj de la reta medio. Unuflanke tio estas diversaj sekurigoj kontraŭ misuzo de personaj informoj de la delegitoj, malebligado de amasaj retdissendoj k.s. Aliflanke tio estas diversaj faciligoj, kiuj permesas rapide trovi la necesajn informojn kaj komforte ekkontakti la bezonatan personon. Ekzemple, el la "Reta Jarlibro" oni facile povas sendi retleteron al ajna delegito, kiu havas retadreson, sed la retadreso ĉiam restas kaŝita.

UEA daŭre eldonos la Jarlibron ankaŭ en presita formo. Post la testado kaj funkciigo de "Reta Jarlibro" estas antaŭvidate aldoni pliajn informajn servojn, iom post iom veran "Retan Oficejon".

(el komuniko de UEA mallongigis mm)

Tri novaj titoloj en "Oriento-Okcidento"

La eldonserio "Oriento-Okcidento", aŭspiciata de UEA, pliriĉiĝis per tri mondliteraturaj ĉefverkoj en la jaro 2004. Unue Fonto en Brazilo eldonis "Leteroj de Paŭlo kaj lia Skolo". Tiu ĉi 253-paĝa parto el la kristana Nova Testamento estas tradukita de Gerrit Berveling. En la 89-a Universala Kongreso en Pekino Ĉina Fremdlingva Eldonejo lanĉis majstraĵon de la klasika ĉina literaturo, la romanon "Ĉe akvorando". La Esperanta traduko de Laŭlum aperis en tri volumoj, kies 1830 paĝoj konsistigas la plej ampleksan eron ĝis nun en la serio. Impona volumo estas ankaŭ la fama romano de la ĉeĥo Jaroslav Hasek, "Aventuroj de la brava soldato Ŝvejk".

dum la mondmilito”, kiun la eldonejo Kava-Pech prezentis en la novembra Malferma Tago en Roterdamo. La 711-paĝa libro estas esperantigita de Vladimir Vana kaj eldonita kun ilustraĵoj de Josef Lada.

Serio “Oriento-Okcidento” estas la plej longedaŭra el la kontribuoj de UEA al projektoj de Unesko. Ekde 1961 aperis en ĝi 39 numeritaj kaj 2 ne-numeritaj verkoj, pluraj aperis jam en pli ol unu eldono. Preskaŭ ĉiuj estas daŭre aĉetebaj. Pri akcepto de novaj titoloj al la serio decidas la Estraro de UEA. Kiu kolektas la tutan serion, tiu posedas reprezentan bibliotekon de la monda literaturo.

(el komuniko de UEA mallongigis mm)

AT-vojaĝo kun muzika kaj literatura kulturo

La Aŭtunaj Tagoj-vojaĝo al Esperanto-Domo en Lesjöfors realiĝos. Sveda Esperanto-Instituto organizos sian tradician seminarion ĉi-foje kunlabore kun Esperanto-Asocio de Finnlando. La temo de la seminario estas muzika kaj literatura kulturo de Finnlando kaj Svedio.

Lesjöfors situas en Vermlando, proksimume samdistance de Stokholmo, Oslo kaj Gotenburgo. Temas pri loko kun impona industria historio, nuntempe pli silenta, sed kiu por esperanto ekhavis gravan signifon. La svedaj esperantistoj sukcesis realigi imponan, kuran gastigejon kaj kursejon. La kursejo funkcias kiel oficiala junulargastejo. Nur tre malmultaj Lesjöforsanoj sciopovas esperanton, sed la loko tamen multon signifas ankaŭ por la lokuloj. Mi mem memoras la ĝojajn vizaĝojn de la lokaj gejunuloj, kiuj povis ĝui la koncertojn de Kultura Esperanto-Festivalo 1998 kaj konatiĝi kun personoj de la tuta mondo.

La seminaridatoj estas vendrede la 16an de septembro ĝis dimanĉe la 18a de septembro, sed verŝajne ni startos de Turkuo per ŝipo jam ĵaŭde vespere kaj alvenos, same per ŝipo, reen lunde

matene. Tiel ni povos sperti pli interesan vojaĝon kun kulturaj vizitoj survoje al Lesjöfors.

Prezidanto de SEI estas Lars Forsman. En la seminaria laborgrupo estas Siv Burell, Martin Strid kaj Birgitta Anevik. Krome ni havas kontakton kun aliaj aktivuloj en Svedio, kiuj ankaŭ tre bonvenigas nian alvenon. La ĉefaj kontaktpersonoj flanke de EAF estas Anna Ritamäki kaj Markku Saastamoinen. Ni certas ke ni sukcesos organizi interesan muzikan kaj literaturan programon per la fortoj de la du landoj. Tamen nenio estas ankoraŭ fiksita. Ni bonvenigas viajn ideojn.

Anna Ritamäki

Kongreso de Norvega E-Ligo

Landa kongreso de Norvega E-Ligo okazos 10-12 junio, sur la norveg-sveda landlimo inter Kongsvinger kaj Arvika. Semajnon pli frue oni celebros samloke la centjaran jubileon de la paca ĉeso de la unio inter Norvegio kaj Svedio (1814-1905).

Ni bonvenigos partoprenantojn el eksterlando, kiuj povos internaciigi nian landan kongreson. Ĝisdatigitaj informoj en la TTT-ejo de NEL: www.esperanto.no

*informis Douglas Draper
sek. NEL kaj red. N.E-isto*

Printempa ekskurso al la somerdomo de Setälä-familio

Dum Vintraj Tagoj en Orivesi naskiĝis ideo renkonti printempe en Kallioniemi, la antaŭa somerdomo de la profesoro de finna lingvo kaj literaturo E.N. Setälä kaj lia familio. Ankaŭ konata esperanto-aktivulo Vilho Setälä, la filo de E.N., pasigis somerojn tie en sia infanaĝo. La naciromantikstila Kallioniemi, kiu situas en Ristiina (ĉ. 30 km el Mikkeli al la direkto Lap- ▷

peenranta) estas nuntempe somera restoracio kaj ŝatata vizitloko por boatistoj, kiuj krozadas sur la Saimaa-lagaro. 3 km el Kallioniemi troviĝas grava prahistoria vidindaĵo, la rokaj desegnaĵoj de Astuvansalmi.

Esperantoklubo de Jyväskylä aranĝos la **ekskurson al Kallioniemi sabaton la 28-an de majo** kaj invitas ĉiujn esperantistojn kun siaj amikoj kolektiĝi tie kun ni kaj konatiĝi kun la somera paradiso de Setälä-familio kaj kun rokaj desegnaĵoj. Eblas manĝi abundan lunĉon de memserva tablo en la restoracio, ĝui la pejzaĝon lagoregionan, renkonti geamikojn kaj promeni sur la padoj esperante aŭ finnlingve. Lunĉo kostas 11 e.

Por antaŭmendi la lunĉon kaj ricevi pli detalajn informojn bonvolu kontakti plej laste 15.5. retpoŝte *kari.kettunen@ppi.inet.fi* aŭ telefone al Seija kaj Kari Kettunen tel. (014) 254 609 (respondilo ekzistas).

*Ĝis la revido en Ristiina!
Esperantoklubo de Jyväskylä*

Eventokalendaro de EAF

30.4-4.5.05 Eŭropa Amikeco-seminario kun Euroscola (ELFI)

4-8.7.05 Esperantokursoj (Valamon kansalaisopisto)

16-23.7.05 Kultura Esperanto-Festivalo (FEJO, EKH)

22.7.05 BB3 Buse al Baltio -karavano startas (EAF)

23-30.7.05 Universala Kongreso, Vilno, Litovio (UEA)

31.7.05 BB3 revenas al Finnlando

31.7-7.8.05 Internacia Junulara Kongreso, Zakopane, Pollando (TEJO)

16-18.9.05 Aŭtunaj Tagoj + seminario, Lesjöförs, Svedio (EAF, SEI)

EAF-laborkunvenoj

9-10.4 AKK-grupo kun estraro, Kimito

Estraro kunvenis

La 19-an de februaro 2005 je 11.15-16.05. Ĉeestis Anna Ritamäki, Tiina Oittinen, Tuomo Grundström, Taneli Huuskonen, Päivi Saarinen, Markku Saastamoinen, Timo Pirinen, Eero Rinta-Karjanmaa, je pritrakto de financoj Anna-Liisa Heikkinen, kasisto.

La estraro decidis donaci lernolibron de Forsman-Pyhälä al Mohammed Bettahar, kiu loĝas en Turku. Li faros arablingvan lernolibron pri Esperanto kaj kolektas aliajn lernolibrojn por trovi ideojn.

La estraro konstatis, ke malgraŭ ekzisto de prepara laboro jam farita la asocio ankoraŭ ne havas financan regularon (taloussääntö). Estas dezirinde ke la laboro pri ĝi estu finfarita. La asocio jam havas administran regularon (hallinnolliset ohjeet). En ĝi estas skribita ke repago de vojaĝkostoj okazas laŭ la ĝenerala vojaĝregulara praktiko (yleisen matkustussääntökäytännön mukaan). La estraro interpretis tion tiel ke eblas uzi la plej malmultekostan, konvenan transportilon. Gravaj motivoj la uzon de alia transportilo ol la plej malmultekosta. Rilate al konkreta vojaĝfakturo al estrarkunveno la estraro laŭ tiu principo decidis repagi 217 eŭrojn.

La estraro subskribis la rezultokalkulon kaj bilancon. Ĝi longe diskutis pri la financaj aferoj pro la negativa rezulto de 2004. La estraro traktis la aliajn jarkunvenpreparajn aferojn.

Rilate al la oficeja ĉiumarda deĵorado Taneli Huuskonen informis ke li provizore respondecos pri tio ke ĉiam estos deĵoranto. En la oficejo estas nun kajero, kie la deĵoranto notos la bazajn faktojn pri la deĵorado, ekz. kvanton da telefon-alvokoj. Aktivaj deĵorantoj krom EKH-anoj estas almenaŭ FEJO-anoj kaj Päivi Saarinen.

La estraro diskutis vigle pri diversaj alternativoj por havigi novan ĉefdelegiton kaj peranton de UEA kaj decidis informiĝi pri la ebleco transpreni la prizorgon de la ĉefdelegita konto ĉe banko Sampo.

Al Vintraj Tagoj en Orivesi ĝis tiam estis ĉ.

35 aliĝintoj. Sendo de gazetara komuniko al lokaj amaskomunikiloj estis preparita (kolekto de adresoj, komuniko en nova serio Esperantolehti tiedottaa, kiu ankaŭ aperas rete, titolo de komuniko Esperantoliitto tulee Orivedelle, unue poŝta sendo kun la plej nova numero de Esperantolehti, poste retroŝta rememorigo pri la evento).

La estraro fiksas la datojn por Aŭtunaj Tagoj en Lesjöfors, Svedio: 16.-18.9.2005. Sveda Esperanto-Institututo faris peton al Kulturfonden för Sverige och Finland (Kulturfonduso por Svedio kaj Finnlando) kun la temo Esperanto i litteratur och musik i Finland och Sverige (Esperanto en literaturo kaj muziko en Finnlando kaj Svedio).

Sekvaj Vintraj Tagoj estos aranĝitaj en Turku en marto 2006 kunlabore kun Esperanto-societo en Turku.

La estraro decidis ke EAF nomumos du Agantojn de la jaro 2004, Carola Antskog kaj Pekka Välimäki pro la sukcesa okazigo de Euro-scola-vojaĝo kun prepara Eŭropa Amikeco-seminario.

La projekta grupo de Al kvalita komunikado kunsidos en Orivesi vendrede-sabate (11.-12.3.)

por prepari agadraporton kaj la aprilan seminaron. La AKK-grupo aranĝos seminarion kune kun la estraro 9.-10.4.2005 en Källkullen, Kimito (Kemiö) por prilabori en praktiko la agadplanon de la tria projekta fazo.

Estraro kunvenis en Orivesi en malnova konsisto 12.3. kaj en nova 13.3. En la sabata kunveno la estraro formaligis siajn antaŭajn diskutojn pri invito de du honoraj membroj: Anna-Liisa Heikkinen kaj Heta Kesälä.

La estaro decidis ke EAF pretas transpreni la taskon de UEA-peranto. La estraro informiĝis pri la preparoj de Kultura Esperanto-Festivalo, KEF-kunsidon 2.3. partoprenis Päivi Saarinen kaj ankaŭ el la estraro Taneli Huuskonen, kiu estas ano de la organiza komitato de KEF. Krome ni eksciis ke Päivi kaj Taneli prilaboris proponon pri renovigita interkonsento inter EAF kaj EKH pri la prizorgado de la oficejo.

En la vere mallongega dimanĉa kunveno la nova estraro, samtempe kun sia fotiĝo, decidis pri elektoj de la estraraj funkciuloj, samaj kiel antaŭe. Ankaŭ la estraro konstatis ke la kasisto kaj librotenisto pretas daŭrigi.



Estraro de EAF 2005.

BB3 (Buse al Baltio) karavano realiĝos

La planita karavano de EAF estos aranĝita plimalpli laŭ informoj en Esperantolehti 6/2004. Nur ŝanĝiĝis la vojaĝagentejo kaj ankaŭ iom la itinero, ĉar Pohjolan Matkatoimisto el Iisalmi faris al ni pli favoran oferton. La ekveturo el Helsinki estos vendrede 22.7. je 12.30 kaj la karavananoj alvenos al Tallinn je 14.40. De tie ni ekveturos per estona aŭtobuso al Jurmala, kie ni tranoktos. Sekvan tagon ni estos posttagmeze en Vilno, kie ni partoprenos la kongreson kaj loĝos en hotelo Victoria. Post la kongresa semajno hejmvojaĝo komenciĝos sabate 30.7. post la kongresa fermo. Ni tranoktos en Valmiera kaj estos 31.7. denove en Tallinn (ĉ. je 15.00) kaj Helsinki ĉ. je la 18.00. La nuna prezo por minimume 20 personoj estas 502 eŭroj por la tuta vojaĝpaketo, sed ĉar jam pli ol 30 personoj definitive aliĝis la prezo eĉ malaltiĝos.

Eblas ankoraŭ aliĝi al la karavano. Kontaktiĝu kun Tiina Oittinen (EAF-sekretario, kontaktinformoj sur paĝo 2).

*Bonvenon ĉiuj!
Tiina Oittinen*

Valamo-kurso

Memoru ankaŭ la ĉi-jaran Esperanto-kurson en Valamo. Bonega ebleco ripeti lingvajn aferojn antaŭ la someraj eventoj kiel KEF kaj UK. Kontaktpersonoj: Tiina Oittinen (EAF-sekretario) kaj Carola Antskog (ELFI-prezidanto).

Valamon esperantokurssi

Muista ilmoittautua myös Valamon esperantokurssille heinäkuun alussa. Erinomainen tilaisuus kerrata esperantoa ennen kesän tapahtumia. Suosittele alkeiskurssia kaikille esperantosta kiinnostuneille, siellä saa perustiedot juuri sopivasti ennen KEF:iä ja Vilnan maailmankongressia. Ilmoittautumiset suoraan Valamoon tai yhteyshenkilöiden (Tiina Oittinen ja Carola Antskog) kautta.

Esperanto-societo en Turku

Esperanto-societo en Turku havis la laŭstatutan jarkunvenon la 6-an de februaro 2005 kaj elektis funkciulojn jene: Prezidanto: Tiina Oittinen, vicprezidanto: Anna-Liisa Ali-Simola, sekretario: Leena Tiusanen; membroj: Paula Harju, Väinö Havu, Varpu Karo kaj Anja Launiainen, vicmembroj Mohamed Bettahar kaj Veikko Tikkanen (ankaŭ librotenisto). Revizoroj: Ilpo Forsström kaj Leila Laineoja, vicrevizoroj: Jorma Ahomäki kaj Kerttu Kemppinen.

La societa vivo daŭras same vigle kiel lastjare. Informoj pri aranĝoj aperos en membro-cirkulero Informilo kaj TS-Treff (asocioj informas). Propraj TTT-paĝoj de EST pretiĝos baldaŭ sub EAF-paĝoj.

La ĉiusemajnaj renkontiĝoj estas la merkreda Diskutrondo je 16.30 en la kafejo de Stockmann kaj la Esperanto-kurso marde je 15.30 en Aurala Civitana instituto. En biblioteko de Runosmäki estos en aprilo informa ekspozicio kaj semajnfine 23.-24.4. estos aranĝita informa elementa kurso en Aurala. Printempa ekskurso al la pico (pizza)-restoracio de Mohamed Bettahar en urboparto Ilpoinen okazos 14.5. Muzea vizito al la denove malfermita Arta Muzeo estas planata en aŭgusto. Vizitantoj estas bonvenaj al ĉiuj aranĝoj, aparte ĉiuj estas invititaj al nia ĉi-jara printempa ekskurso. Kontakti la estraranoj por pliaj informoj.

Turun Esperanto-yhdistyksen tilaisuuksiin ovat tervetulleita kaikki esperantosta kiinnostuneet. Runosmäen kirjastossa on huhtikuun ajan esperantosta kertova näyttely. Auralan kansalaisopistossa järjestetään viikonloppuna 23.-24.4. esperanton esittelykurssi, jossa tutustutaan kielien alkeisiin sekä esperantokulttuuriin. Seuraa myös ilmoittelua TS-Treffin yhdistykset-palstalla. Lisätietoja pj. Tiina Oittinen, 02-2305319, tiina.oittinen@pp.inet.fi tai siht. Leena Tiusanen, 02-2320542.

EST-estraro

EAF prizorgas peradon de UEA-pagoj

La estraro de Esperanto-Asocio de Finnlando decidis ke la asocio pretas transpreni la taskon de peranto por UEA. Nia multjara ĉefdelegito, Heta Kesälä, pro malbona sanstato, ne plu povas prizorgi la taskojn. La kutima bankkonto en banko Sampo estos transdonita de Heta por prizorgo de EAF. Vi povos do daŭre sendi pagojn por UEA kaj mendojn de la samaj gazetoj kiel antaŭe uzante la saman konton, Sampo 800029-19438647 (kiel ricevanto de la pago vi povas skribi UEA).

Sendu aliĝilojn, mendilojn kaj informojn pri viaj pagoj al la adreso de EAF en Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki aŭ al la retadreso eafoficejo@esperanto.fi. Respondeculo de EAF por prizorgi la peranto-taskon estas vicprezidanto Päivi Saarinen.

La estraro

EAF hoitaa maksut UEA:lle

Suomen Esperantoliiton hallitus on päättänyt, että liitto on valmis hoitamaan maksujen toimitamisen UEA:lle. Monivuotinen UEA:n pääedustaja Suomessa, Heta Kesälä, joutuu terveydellisistä syistä luopumaan tehtävästä. Tuttu Sampo-pankin pankkitili siirtyy Hetalta EAF:lle ja sitä voi siis edelleen käyttää maksettaessa erilaisia maksuja kuten kongressien osallistumismaksuja, muita maksuja UEA:lle ja lehtitilauksia. Tilinumero on Sampo 800029-19438647 (maksun saajaksi voit merkitä UEA).

Lähetä ilmoittautumislomakkeet tai mahdolliset selvitykset maksuistasi kirjeitse EAF:n osoitteeseen Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki tai sähköpostitse eafoficejo@esperanto.fi. EAF:n UEA-maksuvälityksen hoitaa käytännössä varapuheenjohtaja Päivi Saarinen.

Hallitus



Dum Vintraj Tagoj en Orivesi: de maldekstre Lauri Häkli, ĵurnalistoj Sirkka Iso-Ettala (Aamulehti) kaj Hannu Karjalainen (Keskisuomalainen), kaj Anna Ritämäki.

FEJO 2005

Prezidanto

Patrik Austin, Helsinki
040 750 4065
patrik.austin@helsinki.fi

Sekretario

Katja Lampinen
040 523 6076
katja.lampinen@suomi24.fi

Kasisto

Paula Niinikorpi
040 527 4821
paula.niinikorpi@gmail.com

Vicprezidanto

Elina Hallman, Helsinki

Estraranoj

Elina Nyqvist, Helsinki
Mikko Mäkitalo, Turku

Vicestraranoj

Pipsa Ahonen, Turku
Liisa Viinanen, Köln
Timo Pirinen, Hamari

Membrokotizo

Por sub 30-jaruloj
– membrokotizo 3 e
– mendo de Esperanta
Finlando 10 e

Por subtenantaj membroj

– membrokotizo 10 e

Kontonumero

563000-2213606
(Rauman seudun OP)

Retpoŝtlisto

Aliĝu per sendi malplenan
mesaĝon al: fejo-subscribe
@yahoogroups.com

TTT-paĝoj

<http://www.esperanto.fi/fejo/>

Tunnelmaa ja rockia Kumpulassa

Tämän vuoden ensimmäistä Fejo-viikonloppua vietettiin Helsingin Kumpulassa, romanttisten puutalojen kaupunginosassa. Helmikuun toisena viikonloppuna mukana menossa viihtyi niin Fejokonkareita kuin EsperHe:en ja JEH:n väkeäkin. Yhteensä osallistujia oli vajaat viisitoista.

Talviliikunnan suhteen Fejo teki uuden aluevaltauksen. Perjantai-iltana Kumpulassa pulkkamäessä nähtiin huikeita laskusuorituksia. Rohkeimmista tyylinäytteistä vastasi EsperHe:en Antti Tahvanainen. Myös tandemplasku osoittautui suosituksi tavaksi. Pulkkamäen jälkeen lämpeä sauna, ruoka ja tunnelma. Majapaikan viikonloppu viettäjäille tarjosi Riitta Hämäläinen.

Keväiseen tapaan Kumpulassa viikonloppuna järjestettiin myös Fejon vuosikokous. Hallitukseen saatiin uusia, innokkaita kasvoja ja jäsenmaksua viilattiin maksajaystävällisempään suuntaan. Katso tarkempia tietoja oheisesta infolaatikosta.

Vuosikokouksen lopuksi valittiin perinteisen ”La plej afrodisia kovrilo”-palkinnon saaja Esperanto-lehden vuoden 2004 kansikuvien joukosta. Äänestyksen voitti kansikuva numerosta 6/04. Fejo onnittelee lämpimästi kuvan



Näin laskee EsperHe: edessä Helsingin yliopiston esperantokurssin vetäjä Riitta Hämäläinen, takana innokas kurssilainen Antti Tahvanainen.



Linssisoppa lämmitti yleisön vatsaa ja mieltä FEJO-viikonloppuun. Kauhasta varressa Pipsa Ahonen.



ottanutta Taneli Huuskosta!

Viikonlopun hui-pennus oli Tunnelmarock, joka järjestettiin lauantai-iltana Kumpulan kylätilassa. Paikalle oli kutsuttu paitsi fejo-laisia, myös tuttuja ja lähistön asukkaita.

Illan artisteina olivat

suomeksi esiintynyt rockduo Herne sekä Dolchamar. Herneen rallit kohottivat hymyn huulille ja vaihteeksi akustisena kuultu Dolchamar soi varsin komeasti. Tunnelmaa ja lämpöä toivat myös fejo-laisten tekemä maukaus linssisoppa ja kymmenet kynttilät.


Katja Lampinen

Aganto(j) de la jaro 2004

Pekka Välimäki kaj Carola Antskog estis kune nomumitaj Agantoj de la jaro 2004 de Esperanto-Asocio de Finnlando, pro la instruado al gimnazianoj kaj la realigo de Euroscola en Esperanto kun prepara internacia seminario Eŭropa Amikeco en Strasburgo. La premio konsistas el Pasporta Servo 2005, kolekto de la antaŭaj Eŭropa Bulteno aperintaj en La Ondo de Esperanto kaj abono de la gazeto por 2005. Aldone la esperantista EU-parlamentanino Margareta Handzlik, lige al la sekva Euroscola en Esperanto, provizos al ili surprizon.

(mm)

duplustro



1.3.
2005

Kvalita komunikado en nacia nivelo

Por Katja Lampinen, 27, grandaj redakcejoj kaj komunikoj de internaciaj novaĵ-agentoj estas ĉiutaga afero. Ŝi prezentas humila la ”redakcieton”, kiu estas parto de Alma Media, sed baldaŭ fariĝos parto de nova, alilanda posedanto. Tiu redakcieto estas la sama, de kie oni interalie sendas la novaĵojn de MTV3. Dimanĉ-vespere la statuaj kameraoj staras senmovaj en malhelo kiel kornikaj timigiloj, sed ĉiam estas vivo kaj lumoj en pluraj aliaj laborstacioj.

Katja petas momenton por kontroli en la novaĵservo, ĉu venis freŝaj temoj por la sekva ĉiuhora novaĵa elsendo de Radio Nova. Ŝi forklaketas dekojn da rubrikaj por indiki ilin legitaj. Du mesaĝoj elstaras de la amaso: toksiga akcidento ĉe grupo de gejunuloj en Hispanio kaj nova raporteto pri la stato de la enhospitaliĝinta papo. Ĉi foje la papo gajnos la 20 ĝis 30-sekundan atenton.

Post ĝisdatigo restas tempo por montri, kiel efektive la entute 20 dungitoj – pliparte liberaj redaktistoj kiel Katja – laboras en la telegrama redakcio de MTV3. La prasonanta nomo praktike signifas diĝit-eraan redakcejon de mallongaj noticoj. Krom la sonaj kaj paperaj novaĵiloj tien venis modernaĵoj kiel mobilnovaĵoj: servo por abonantoj, kiuj volas tuj ricevi novaĵojn en elektitaj temoj en siaj mobiltelefonoj.

– Tiu servo estas eta sed tre grava por kelkaj homoj, Katja klarigas kaj montras, kiel oni ĝisdatigas teletekston. – La laboro konsistas ĉefe el ĝisdatigado. Pro ŝparaj celoj oni ne plu povas eliri de la laborejo por fari intervjuojn, sed se bezonata inserto (t.e. intermetota sonaĵo, ekz. intervjuero) ne troviĝas, oni povas ja uzi telefonon.

Adoleska hobbio iĝis profesio

Kiam Katja estis 17-jara, ŝi havis eblecon iĝi volontula redaktisto de loka radio en sia hejmurbo Keuruu. Eble la unuaj elsendoj ne ĉiam estis superbakvalitaj, sed ŝi entuziasmiĝis kaj post tri jaroj loĝiĝis en Helsinko por studi en la ”stelufabrika” Kristana Instituto de Laajasalo

kaj post tio ekzameniĝis kiel medianomo en la profesia kolegio Stadia. Jam de la komenco ŝi dumstude laboris: en la meritaro jam estas la Radioj Aino, Suomi kaj Dei.

– Nuntempe redaktistoj devas esti ”multpovantoj”, ili uzas la teknikilojn mem. Pro la evoluinta teknologio eblas fari ĉiuspecajn raportojn sen apartaj teknikistoj, kaj tio ŝparas monon de la mediaj kompanioj. Katja konfesas, ke ŝi iom zorgas pri la estonteco de la branĉo: ĉu la labora diverseco foriĝas dum la postuloj kaj rezulta respondecado pliiĝas kun kreskanta konkurenco?

– Mi tamen daŭre kredas je YLE, kie oni faras kvalitan ĵurnalismen, Katja diras, sed agnoskas, ke eĉ en la komerca sektoro troviĝas kvalitaĵoj inter senutilaĵoj.

Esperanto en la amaskomunikiloj(n)

Multaj esperantistoj konas Katja Lampinen kiel Fejo-aktivulon. Ŝi lernis la lingvon en kursoj de Laborista Instituto antaŭ KEF 2000 kaj de tiam interesiĝas pri esperantaj aferoj.

– Esperanto estas tro vasta temo en si mem, sed iu interesa kuriozaĵo – kiel la apero de la unua esperantorokalbumo iam eldonita en Finnlando – povas bone taŭgi kiel novaĵo en Radio Nova. Kutime kiel novaĵa ”leĝeraĵo” en la fino de elsendo. Homoj havas pozitivan imagon pri Esperanto, kaj ĝi povas interesi kaj iom ridetigi ilin. Alie en Radio Nova ne estas veraj magazinprogramoj, kaj entute Esperanto estas iom maloportuna temo por la celgrupo.

– Tamen indas sendi interesajn priesperantajn komunikojn al la medioj. Se la komunikado cetere

estas bone farita kaj venas, kiam la ”novaĵa sojlo” malaltas, ĝi havas plian ŝancon esti elektita. Ekzemple ĝuste dimanĉvespere estas malmultaj okazoj, do tiam estas loko por diversspecaj aferoj. Same la somerferiaj semajnoj, ĝuste kiam okazos KEF 2005, estas plej oportunaj por Esperanto.

– La plej bonaj komunikoj, ekzemple ĝuste tio pri la nova albumo de Dolchamar, postulas malmultan prilaboradon. Oni povas praktike kopi-glui ĝin rekte de la retpoŝto. Krome frapanta rubriko plibonigas la ŝancon, iu, kiu diras mallonge kaj trafe pri kio temas. Do bona gazeta komunikado similas gazetaran artikolon.

– La plej malinteresa rubriko siaparte estus iu ”R.K.F. informas.”

Teme pri la plej bona maniero sendi komunikojn Katja rekomendas ĝuste retpoŝton.

– Almenaŭ ĉi tie. Nia poŝtujo estas en kaoso, kaj individuaj fakoj malaperas en senfina amaso.

Katja Lampinen estas unu el la prelegantoj de KEF 2005

Fine staros la leĝeraĵo

Estas tempo por Katja iri al la novaĵlegeja ĉelo por peri la plej ĵusan novaĵgisdatigon al dimanĉaj radioaŭskultantoj. Antaŭ tio restas tempo por unu plia demando: ĉu estas tipo da novaĵoj, kiujn vi persone ŝatas laŭtlegi?

– Jes, mi ŝatas legi kulturnovaĵojn kaj pri sanecaj temoj, cetere la finaj leĝeraĵoj estas ofte amuzaj, kiom da runebergaj tortoj finnoj manĝas ktp. En Radio Nova estas ankaŭ ofte aferoj pri parrilatoj kaj esploroj pri viroj kaj virinoj. Sporton kaj ekonomion mi malamas. Eble en la estonteco mi laboros en alia redakcio, kie eblas fari intervjuojn kaj radiodokumentojn, tion mi vere ŝatus.

Por Katja la homa intereso de novaĵoj estas klara.

– Aŭskulto al novaĵoj estas spirita momenteto por certigi ke ĉio estas pli-malpli en ordo en la mondo. Laŭ esploroj oni sentas sin pli komforta post la aŭskultado sed memoras malmulte de la enhavo.

Patrik Austin





Ekzotiklandaj KEF-artistoj: Probal Daŝgupta



Probal Daŝgupta (n. 1953) estas profesoro pri aplika lingvistiko en la universitato de Hajderabado, Hindio, kaj verkisto de multaj internacie konataj publikaĵoj en sia esplorfako, ekz. *The Otherness of English* kaj (kun R. Singh kaj J. K. Lele) *Explorations in Indian Sociolinguistics*, kiuj temas pri sociolingvistiko de la angla en Hindio. Al KEF 2005 li venos kiel verkisto de originala esperanta literaturo kaj tradukisto de originale bengallingvaj verkoj. Li estas rekonata kiel unu el la plej rimarkindaj eseistoj en Esperantio pro la elstarantaj formo, lingvo kaj ideoj de siaj tekstoj.

Ni atingis Probal Daŝgupta retpoŝte en sia hejmo en Barato, kiel li nomas sian hejmlandon.

– Mi lernis esperanton autodidakte en 1967 kaj praktikis ĝin kun mia unua korespondamiko el Ĉeĥoslovakio, per kies okuloj mi rigardis la eventojn de 1968. La 60aj jaroj estis kriza tempo ne nur en Eŭropo, sed ankaŭ en Okcidenta Bengallando, mia devena gubernio en Barato. Mia persona partopreno en la tiutempaj eventoj muldiĝis ĉirkaŭ mia bizara esperantisteco, nekutima tiel en mia loĝurbo Kolkato, kiel en la esperantista komunumo. De tiu mia soleco fontas mia verkemo.

Graŭ aŭ malgraŭ siaj okcidentlandaj kontaktoj Probal Daŝgupto rigardas sin precipe kiel azian esperantiston. Lia unua esperantlingva teksto – recenzo pri hindia romaneto – aperis en la revuo Esperanto jam en 1969, sed li iĝis konata kiel tradukisto kun riĉa kaj originala skribstilo en 1977, kiam li partoprenis la Universalan Kongreson por la unua fojo.

– Montriĝis, ke estis avantaĝo la sovaĝa kaj senkontakta izoliteco de mia unua esperantista jardeko. Kreskis en tiu medio stranga, nova

maniero uzi la vortofarajn potencialojn de nia lingvo.

En la UK de Rejkjaviko Daŝgupta estis laŭdata interalie de William Auld kaj Marjorie Boulton.

Grandega paletro da eksperimentoj

Daŝgupta estas avida leganto. Kiel personajn favoratojn li nomas la verkojn de siaj propraj gepatroj: lia patro estas fakulo pri sudorientazia historio kaj patrino romanisto kaj literatura analizisto, parton de kies autobiografio Daŝgupto tradukis en Esperanton (*Mi Juna*, Esperantaj Kajeroj, 1989). Esperantan literaturon li vidas kiel ”grandegan paletron da eksperimentoj”. De ĝi li nomas Johan Valano, Mauro Nervi kaj Abel Montagut.

– Nia literatura mondo estas tiel disa, ke laŭ mi la homoj ne verkas sub forta influo unu de la alia. Mi spertas fortan tenton komenti pri la tre gravaj kaj tre ĵusaj poemaroj de Jorge Camacho, sed mi ŝuldas recenzojn, kaj do bridos la langon.

En KEF 2005 Probal Daŝgupta ne nur prelegos sed gvidos skribatelierojn por la partoprenantoj kunlabore kun Jorge Camacho kaj Sten Johansson. Li volas ankaŭ kontribui la infanan programon per bengalaj fabeloj. Daŝgupta neniam antaŭe vizitis Finnlandon sed bone konas verkojn de Vilho Setälä kaj havas esperantistajn amikojn ĉi tie.

– Mi esperas, ke la vizito al Finnlando estos por mi same grava kaj atento-remulda, kiel mia unua vizito al Japanio en 1982.

Patrik Austin

Dolchamarin levy ja talvipäivät poikivat juttuja

Aamulehdessä 13.3. esiteltiin EAF:n Talvipäiviä Orivedellä ja esperanton syntyä. Haastattelussa Patrik Austin ja Anna Ritamäki kertoivat Dolchamarista sekä esperantoliiton haasteesta kehittyä kielipoliittiseksi ja yhteiskunnalliseksi vaikuttajaksi. Vuoden 2007 Esperanton 100-vuotisjuhliin on valmistumassa Jukka Pietiläisen kielen historiasta ja merkityksestä kertova kirja. Myös Tamperelaisen Lauri Häklin Askelten jäljet -kirjaa käännetään esperantoksi. Ne levittävät kieltä edelleen.

Rebela Sonon ilmestyminen ja keikat sen musiikilla saivat lehdet kirjoittamaan Dolchamarista. Bändin kotikylän lehti, Uusimaa kirjoitti orkesterista ennen ja jälkeen Porvoon keikan sekä arvioi levyä omassa artikkelissaan. Dolchamar esitellään ainoana suomalaisena esperantorockbändinä ja eräänä tunnetuimmista alan bändeistä maailmalla. Lisäksi kerrotaan esperanton synnystä ja puhumisesta tällä hetkellä. Levyn arvioinnissa musiikkia pidettiin ammattimaisen irtolaisena ja kulkevana, ja 12 kappaleen joukosta erottuivat Junaj idealistoj ja Subamighi. Rimanalituksia ei levyllä ollut. Laulu ja soittaminen oli bändillä hallussa. Lopuksi todetaan, että ”Esperanto saattaa olla näille kavereille loppupelissä enemmän rasite kuin hyöty.” Onkohan tuo viittaus siihen, että levybisneksessä loppupelit pelataan usein euroilla?

Uusimaa-lehti arvioi Dolchamarin Porvoon keikkaa myönteisesti, musiikki kelpasi 50-päiselle yleisölle, vaikka sanoja he eivät ymmärtäneet – ainakaan kaikki. Keikalla soitettiin pääasiassa Rebela Sono -levyn kappaleita. Keikka meni hyvin, ja Porvoon esityksen perusteella kysyntää pitäisi riittää, kirjoitti Samu Karvala Uusimaassa.

Ruotsinkielisessä Studentbladetissa 1/05 Dolchamar esiteltiin koko sivun jutussa. Kaikkihan alkoi siitä, kun Patrik Austin Englannissa opis-

keli esperantoa, ja teki esperantokavereiden kanssa ensimmäiset levyt ranskalaiselle levy-yhtiölle. Ruotsin keikalla 2003 yhtyeen nimi muutettiin ja he tekivät uusia kappaleita, jotka riittivät levyillekin. Studentbladetin mukaan Rebela Sono sisältää bändin koko musiikillisen kirjon.

Levyn ideologiasta Patrik toteaa, että tänään ovat toimintamahdollisuudet ja valinnanvara elämässä toiset kuin pari- kolmekymmentä vuotta sitten. Tästä mahdollisuuksien maailmasta kerromme.

Vieras kieli ei kuuntelua haittaa, arvioi Patrik, vaikka levyä ymmärtävät parhaiten ne, jotka osaavat esperantoa tai romaanisia kieliä. Tästä eteenpäin bändi etsii laajempaa yleisöä eikä vain esperantisteja. Levyllä Dolchamar on pyrkinyt murtamaan esperanton tiukkoja kielellisiä sääntöjä, joita jotkut ovat halunneet liittää sen käyttöön.

Karjalainen arvioi 9.2. Rebela Sono -levyn. Musiikki on 80-lukulaista melodista ja rytmikästä perusrockia, ja kieli kelpaa musikaaliseksi laulukieleksi. Miksausteknisesti levy ei ollut loistelas paketti.

Koillis-Häme -lehdessä esiteltiin Mauri Ahlstedt, joka viisikymmentä vuotta tiukasti Suomessa, Jämsässä, asuneena opiskeli itseksensä esperantoa ja sen jälkeen otti yhteyttä maailmalle ja matkusteli esperanton avulla. Muutaman vuoden jälkeen hän tutustui kirjeenvaihdossa tšekkiläiseen naiseen, jonka kanssa hän meni naimisiin. Pariskunnan kotikieli on esperanto. Ystävyys-suhteita Mauri on pitänyt yhä yllä maailmalle, mm Jarlibron välityksellä, ja vieraita on käynyt mm. Unkarista, Puolasta, Latviasta ja Saksasta. Maailmalta löytyy esperanto-juttukavereita, mutta Jämsässä ei heitä löydy, hän harmittelee.

Jukka Noponen

KELF 70-jara

Kristana Esperantista Ligo de Finnlando estas fondita la 24-an de marto 1935. Tio okazis kadre de tutlanda kongreso en Turku. La tiama prezidanto de EAF estis Hugo Salokannel, kiu kun kelkaj aliaj kristanaj esperantistoj fondis la ligon. Al la unua estraro apartenis kiel prezidanto pastoro, pli poste preposto, P. O. Ekko, lia edzino Lisa Ekko kiel sekretario, Uuno Kallio, O. von Zansen kaj Hugo Salokannel. La sekvantan tagon, kiu estis dimanĉo, pastoro P. O. Ekko predikis al la kongresanaro en la preĝejo de Uusikaupunki, kien la kongreso ekskursis.

La agado estis vigla. Laŭ la historio de KELF okazis la jarkunveno en 1937 en Uusikaupunki kun multe da programo. La prezidanto prelegis interese pri la granda signifo de Esperanto kiel lingvo de kristana misio inter fremdlingvanoj. Li mem spertis tion ricevinte informpetojn pri finna eklezia vivo de eksterlandaj pastoroj. Samtempe li montris kristanan Esperanto-literaturon kaj nian Gazeton Dia Regno. Post kafopaŭzo fino Tamminen deklamis kaj staciestro Hugo Salokannel faris vastan prelegon pri utileco de Esperanto kiel misia lingvo.

Komencis la milito 1939. La agado kompren-

eble finiĝis. Sed ĝi ne tute velkis. Okazis diservo en la jaro 1941 en Järvenpää, kie Salokannel tiam loĝis. En Dia Regno estis kelkaj artikoloj de Hugo Salokannel kiel “Ĉu nia religia vivo sekulariziĝos?” Li skribis 1943 “La finna movado vivas kaj havas agadon kvankam silentan. Nun se iam ni bezonas fonton kaj konsolon de la Eternulo.” Salokannel ankaŭ kontribuis al la sveda Esperantomisio. Laŭ Dia Regno ĉiam estis kelkaj finnoj kiuj direkte pagis la kotizon al la internacia kasisto.

T. Ilmari Haapalainen konatiĝis kun Esperanto kaj samtempe kun KELI (Kristana Esperantista Ligo Internacia) 1956. Kune kun Arnold Horsmala li partoprenis en la KELI-kongreso en Hedenesse, Nederlando. En la jarkunveno 1959 en kastelo Nijenrode, Nederlando oni elektis pastoron Haapalainen kiel estraron de KELI. Li ankaŭ fariĝis reprezentanto de KELI en Finnlando.

En ĉi tiu situacio estis nur nature, ke la finna sekcio renaskiĝis. Ĝi fakte neniam mortis. La 28-an de oktobro 1962 en Tapanila okazis kunveno, kiu aprobis regularon, elektis estraron, faris agadplanon kaj fiksas la kotizon. Komencis nova periodo kun funkciuloj kaj kunvenoj.

Olavi Kantele

FEJOn lukijakilpailun vastaus

Lukijakilpailuun ei uudellakaan yrityksellä tullut paljon vastauksia eikä yhtään oikeaa, joten palkinto jää jakamatta.

Oikea vastaus on, että Suomen Pankki, Helsingin yliopisto, Sosialidemokraattinen puolue, suomalainen vapaapalokuntaliike ja FEJO kaikki on perustettu Turussa.

FEJOn perustava kokous pidettiin Turun kristillisellä opistolla 26.2.1977, mutta FEJOn perustamisesta ei ehkä kuitenkaan ole syytä erityisemmin kiittää turkulaisia, perustava kokous vain pidettiin EAF:n talvipäivillä, jotka sinä

vuonna sattuivat olemaan Turussa. FEJOn toiminta oli alkuvaiheessa eniten kuopiolaisten vetämää.

Mikko Mäkitalo

Novajoj de Oulu

Esperanto-societo de Oulu havis sian jarkunvenon la 26-an de februaro. Kiel prezidanto daŭrigas Erkki Röntynen, vicprezidanto estas Allan Mehtonen, kasistino Eila Martin kaj sekretario Auli Vihermä. La aliaj estraranoj estas Stanislawa Mehtonen, Aira Röntynen kaj vice Raili Marttinen. La societo kunvenas ĉiun sabaton je la 12-a horo en la urba biblioteko. Bonvenon!

raportis Auli Vihermä

Suomen Esperantoliiton jäsenjärjestöt

Muutokset ja lisäykset osoitteistoon: Ilkka Santtila, Mannerheimintie 40 D 86, 00100 Helsinki, s-posti ilkka.santtila@esperanto.fi mieluummin kirjallisena.

Suomen Esperantoliiton paikallis- ja jäsenjärjestöt:

- ◆ Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ✉ taneli.huuskonen@netsonic.fi www.esperanto.fi/helsinki
- ◆ Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispihantie 298, 74100 Iisalmi.
- ◆ Jyväskylän Esperantokerho / Esperantoklubo de Jyväskylä (Seija ja Kari Kettunen), Keihäsmiehenkatu 3, 40630 Jyväskylä. ☎ (014) 254 609 ✉ kari.kettunen@pp1.inet.fi
- ◆ Lahden Esperantokerho / Esperantoklubo de Lahti, (Martti Pennanen) Kalliomaankatu 10, 15150 Lahti. ✉ martti.pennanen@phnet.fi
- ◆ Oulun Esperantoseura / Esperantosocieto de Oulu, (Allan Mehtonen) Valtatie 6-8 B 15, 90500 Oulu.
- ◆ Salon Esperantoseura / Esperantoklubo de Salo (Matti Wallius) Eräpolku 1, 25130 Muurla. ✉ matti.wallius@ebaana.net
- ◆ Esperantoseura Antaŭen ry. / Esperantosocieto Antaŭen, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere. (Lauri Liukkonen, Varstatie 37, 37500 Lempäälä, ✉ lauri.liukkonen@jippii.fi)
- ◆ Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku, (Tiina Oittinen) Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ✉ tiina.oittinen@pp.inet.fi
- ◆ Suomen opettajien esperantoyhdistys / Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj, (Carola Antskog) Brokärsvägen 89, 25700 Kimito. ✉ cantskog@kolumbus.fi. Tilinro: 800015-129185
- ◆ Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ✉ fejo@esperanto.fi. Tilinro: 563000-2213606
- ◆ Sokeiden esperanto-yhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. ☎ (09) 660 651

Jäsenyhdistysten jäsenet ovat automaattisesti Suomen Esperantoliiton jäseniä, yhdistykset hoitavat jäsenmaksut liittoon. Liittoon voi myös kuulua henkilöjäsenenä, jolloin jäsenmaksu v. 2005 on 18 e sisältäen Esperantolehden. Nino Runeberg -seuran jäsenmaksu on 36 e. Lisätietoja jäsenyhdistyksiltä ja liiton toimihenkilöiltä.

Lappeenrannassa toimii aktiivinen esperanton harrastajien ryhmä, jolle voi lähettää postia osoitteeseen (Irja Miettinen) Esperantogrupo de Lappeenranta, Yrjönkatu 6-8 A 1, 53600 Lappeenranta.

Useiden paikkakuntien puhelinluettelosta hakusanan "Esperanto" kohdalta löytyy paikallisten harrastajien puhelinnumeroita. Paikkakuntien yhteyshenkilöistä saa tietoa myös Suomen Esperantoliitolta, aktiivisia harrastajia on mm. Mikkelissä, Raumalla, Hämeenlinnassa ja Tavalkoskella.

ESPERANTOLEHTI

ilmestyy vuonna **2005**
aperas dum la jaro

Nro	Red.grupo komencas	Limdato	Aperas
3	1.5.	15.5.	5.6.
4	1.7.	15.7.	5.8.
5	1.9.	15.9.	5.10.
6	1.11.	15.11.	5.12.

Avustajien toivotaan noudattavan edellä esitettyjä aikoja. La redakcio esperas, ke helpantoj atentu la datojn supre.

Ilmoitushinnat ♦ Anonprezoj

Ulkopuoliset mainostajat /

Ekster membraro:	Jäsenet / Membroj:
1/1 sivu/paĝo 100 e	1/1 sivu/paĝo 50 e
1/2 sivua/paĝo 60 e	1/2 sivua/paĝo 30 e
1/4 sivua/paĝo 40 e	1/4 sivua/paĝo 20 e

Sendu la anoncojn aŭ rete al la redaktejo: eaflehti@esperanto.fi aŭ poŝte al la oficejo: Esperantolehti/EAF, Siltasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki.

Palautusosoite: Esperantoliitto
Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki



Esperantolehden yhteyskortti

Lahjatilaus: vuosikerta _ _ _ _ .

Lahjatilauksen saajan nimi ja osoite:

(Lahjatilauksen maksajan nimi ja os. kortin alaosaan)

Tilaukseni päättyy _ / _ _ .

(Osoitetarra kortin alaosaan)

Osoitteeni muuttuu _ / _ _ alkaen.

(Osoitetarra kortin alaosaan)

Uusi osoitteeni on:

Kestotilaus vuosikerrasta _ _ _ _ alkaen.

Tilaus: vuosikerta _ _ _ _ .

Tilaaajan, kestotilaaajan tai lahjatilauksen maksajan nimi ja osoite. Osoitetarran paikka:

**Posti-
merkki**

**Suomen
Esperantoliitto ry.**

**Siltasaarenkatu 15 C 65
00530 Helsinki**

Seuraava numero ♦ Venonta numero

Seuraava numero ilmestyy kesäkuussa. Jutut 15.5.2005 mennessä EAF:n toimistoon. Venonta numero aperos en junio. Artikoloj ĝis 15.5.2005 al la oficejo de EAF. Osoite/adreso: Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, puh/tel. (09) 715 538, s-posti/rete: <eaflehti@esperanto.fi>.